# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2015


*Kara Leganto, preskaŭ fulme forflugis la lasta monato, t.e. periodo post la septembra kunsido de nia E-societo. Malsupre vi povas ledi resumon pri la vivo kaj verkado de V. Stus, al kiu estis dediĉita lasta kunveno. Dum la sama tempo aperis utila anglalingva libro pri E-o en Kroatio, okazis ekonomia forumo pro-Esperanta en Pollando kaj baldaŭ de Varsovio al Bjalistoko – naskiĝurbo de nia Majstro, ekveturos vagonaro kun tre kara al ni nomo – Esperanto!*

*Ne malgrave: jam estas trovita luksa salono por festado de sekvanta Zamenhofa Tago Decembro 13 en Randolfa Turo (vd. apudan foton) 188 W. Randolph St. Ni kolektiĝos en klubejo sur la 25-a nivelo kun pitoreska pejzaĝo. Kiel ĉiam – novaĵoj abundas. Ĝis la post kelkaj tagoj! –La Redakcio*



## Vasil Stus (1938-1985) *de Araneo*

*Estinte socie aktiva jun-viro mi multe aŭskultis t.n. okcidentajn radio-elsendojn, kiel "Voĉo de Ameriko", "Radio Libereco", "BBC", kaj dank'al tiesaj programoj mi eksciis pri famega nun, sed tiam ne multe konata ukraina poeto Vasil Stus, kiu naskiĝis en Vinica provinco, en region de mia patro.*




Lia infaneco kaj juneco pasis en Donecka provinco, kie nun moskoviaj separatistoj penas okupi ukrainajn terenojn. Post la filologiaj studoj en Donecka Universitato en la fino de la 50-aj jaroj de XX jc. li estis instruisto, servis en armeo, laboris kiel ĵurnalisto. Liaj unuaj poemoj aperis komence de 60-aj jaroj en *Literaturna gazeta*. En 1963 li ekis doktorajn studojn en (akademia) "Instituto de literaturo nome de T. Ŝevĉenko", multe verkis, tradukis poemojn de germanaj kaj francaj poetoj. En 1965 oni eligis lin el la kurso pro la protesto kontraŭ la aresto de ukrainaj intelektuloj-alipensuloj (*disidentoj*). Per tio la "normala" vivo finiĝis. Komenciĝis elprovado, hazardaj perlaboroj, konstanta minaco esti maldungita laŭ "persona deziro". En 1972 V. Stus kun aliaj ukrainaj alipensuloj estis arestita kaj kondamnita. Kvankam en 1979 li revenis Kijivon, sed post ok monatoj okazis nova aresto kaj kondamno al 15 jaroj de malliberigo. En la speckoncentrejo por politikaj malliberuloj en Uralo li mortis en 1985. Oni enterigis lin en la sennoma tombo je la rezerveja tombejo. Nur en 1989 la restaĵoj de la poeto kaj liaj sampensuloj estis transportitaj en Ukrainion. "Ni batalis por demokratiigo, – skribis V. Stus en la letero al la Prezidio de la Supera Konsilio de USSR (01.08.1976), – kaj tion oni konsideris kiel pruvo kalumnii la sovetan reĝimon; mia amo al la propra popolo, maltrankviliĝo pri la kriza situacio de ukraina kulturo estis kvalifikitaj kiel naciismo."

La kre-heredaĵo de Vasil Stus, malgraŭ lia mortira sorto, estas sufiĉe granda. La unua poemkolekto *Vintraj arboj*, proponita fine de 60-aj jaroj, ne estis publikigita en Sovetio, sed aperis en Belgio. En 1970 sen ajna espero pri aperigo Stus preparis la duan poemaron sub la elokventa titolo – *Gaja tombejo* – interesan poezian dokumenton de la protesto kontraŭ intelekta anhelo, absurdmanifestacio, imitado de la vivanta vivo. *Palimpsestoj* estas la pinto de la Stus-heredaĵo. En 1985 V. Stus estis nomigita por Nobel-premio pri Literaturo, sed pro lia "neatendita" morto oni ne konsideris lin. Poemojn de Vasil Stus esperantigis Kris Long (Ukraina Stelo, 1991, 4).

*En 1989 jaro mi vizitis mian E-amikon J. Wood en Britio, dank' al kiu ni iris al fortega klubo de ukrainaj "naciistoj" en Bradford. Post tiu vojaĝo mi alportis al Ukrainio 20 kg de "malpermesita" literaturo, inter kiu estis poemaro de V. Stus* "Vintraj Arboj":

Ĉu vere vi naskiĝis por
observi min en mallibero?
Ĉu ne revokas vivaferoj?
Ĉu trafa vivovoj-esplor' –
senĝoje trista ĉi labor'
sen tasko krom pri homsuferoj?
En mia ve' vi reaperas,
per vi duoble mia kor'
doloras. Vi pli malfeliĉas
ol mi. Mi – mem. Vi – ombro nur.
Ekzistas bon'. Vi – putro, spur'.
Komuna pordo nin kondiĉas,
kunkaptas: min, vin – disa tut'
trans muro krom karcerstatut'.

# Speciala Numero


INTERDISCIPLINARY DESCRIPTION OF COMPLEX SYSTEMS

Scientific Journal

SPECIAL ISSUE: THE PHENOMENON OF ESPERANTO

*The Phenomenon of Esperanto* estas la titolo de speciala numero de la revuo INDECS lastatempe eldonita en Kroatio. La kolekto, sub redakto de prof. H. Tonkin kaj d-ro Veronika Poór, estas la dua numero de volumo 13 de INDECS (2015). La kolekto estas anglalingva kun resumoj en la kroata, kaj estas direktita ĉefe al fakuloj ekster la Esperanto-movado.

Dek du artikoloj prezentas ampleksan aliron al Esperanto, inkluzive de trarigardo de la faka literaturo, fare de Detlev Blanke (Berlino) kaj ĝenerala enkonduko de Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, Usono). Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) proponas kontribuaĵon pri Esperanto-frazeologio, Wim Jansen (Universitato de Amsterdamo) ekzamenas Esperanto-gramatikon kaj Duncan Charters (Kolegio Principia, Usono) esploras la instruadon de Esperanto.

La funkciado de Esperanto kiel planlingvo estas esplorata en kvar artikoloj. Ilona Koutny (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando) demandas ĉu komplekseco estas planebla, Federico Gobbo (Universitato de Amsterdamo) ekzamenas la utiligon de Esperanto en maŝintradukado, kaj Detlev Blanke kaj Wera Blanke (Gesellschaft für Interlinguistik) spuras la historion kaj potencialon de Esperanto kiel lingvo de scienca komunikado. Humphrey Tonkin demandas kiel esploroj pri planlingvoj estu aplikataj al lingvoplanado pli ĝenerale.

Per ekzamenado de la rolo de Esperanto en la fluo de ideoj en Japanio dum la fruaj jaroj de la dudeka jarcento, Sho Konishi (Oksforda Universitato) proponas specifan analizon de aparte interesa demando en la historio de ideoj, nome kiel Esperanto kaj rilataj ideoj de lingva demokratio influis kaj influas pensadon kaj politikon en diversaj partoj de la mondo.

La demando pri la amplekso kaj vivanteco de la Esperanto-movado estas esplorata en du artikoloj, kiuj venas al tre malsamaj konkludoj. Krunoslav Puškar (Universitato de Zagrebo) priesploras la kernajn kredojn de la ŝrumpanta tradicia Esperanto-movdo en Kroatio, dum Amri Wandel (Hebrea Universitato, Jerusalemo) ekzamenas la rapidan tutmondan plivastiĝon de Esperanto en Interreto, montrante akran dividon inter la "tradiciaj" movadaj strukturoj kaj la novaj aliroj al Esperanto kaj ties utiligo fare de pli junaj lernantoj kaj praktikantoj sen ligoj kun tradiciaj Esperanto-organizaĵoj.

INDECS estas eldonata en Zagrebo de la Kroata Interdisciplina Societo kun subteno de la Kroata Ministerio pri Sciencо, Edukado kaj Sporto.

La artikoloj estas alireblaj ĉe www.indecs.eu kaj la presita volumo estas havebla ĉe la Libroservo de UEA. *–UEA*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276

**27an de Oktobro, 7-8:30pt** – Kreado de anglalingva prezentado pri E-o, gvidas s-no Randio.

**24an de Novembro, 7-8:30pt** – Temo estos anoncata.

**13an de Decembro, 12-4pt** – Zamenhofa Tago en Randolfa Turo.

# E-novaĵ de Okcidento-Oriento




**Okcidento:**

1. Iĝis jam bona tradicio, partopreni kiel "Esperanto" en la prestiĝa "Ekonomia Forumo" en la pola urbo Krynica-Zdrój. Du jubileoj okazis tie ĉi-jare: la forumo mem festis sian 25an jaron, kaj samtempe Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kun la Esperanto-stando partoprenis ĝin jam la dekan fojon. La forumo, ofte nomata "pola Davos", altiris ĉi-jare rekorde multajn: tri mil partoprenantoj el 60 landoj aliĝis al tiu ĉi grava evento, kiu okazis la 8-10an de septembro 2015. La ekonomia forumo estas aranĝo kun pintaj personoj de la politika, ekonomia, sed ankaŭ de la socia kaj kultura vivo. Tiajn homojn eblas ĉiujare renkonti dum la forumo, kaj ili kreas plejparton de la programo. Ĉi-foje prezidentoj de Pollando, Kroatio kaj Makedonio malfermis la forumon, diskutante pri la plej aktualaj temoj. Esperanto tamen bone videblis en la aranĝo – jam la dekan fojon funkciis la Esperanto-stando, kun buntaj informiloj pri Esperanto en la tri laborlingvoj de la forumo (la pola, rusa kaj angla). *–Libera Folio*

2. La 6an de oktobro finiĝis unusemajna voĉdonado en Facebook, kiun la administracio de la pollanda ŝtata fervojkompanio PKP lanĉis por ekscii, kiujn nomojn oni volas havi por dek novaj rapidaj trajnoj de la kategorio "InterCity". La voĉdonantoj povis elekti unu el la tri proponitaj nomoj por ĉiu itinero. Dum unu semajno estis registritaj ĉ. 50 mil donitaj voĉoj. Unu el la dek trajnoj cirkulos ĉiutage inter Varsovio kaj Bjalistoko. En la voĉdonado pri ĝi plej multe da voĉoj ricevis la nomo Esperanto, kiun preferis 3986 personoj. La "fina venko" de Esperanto estas ŝuldata ne nur al bjalistokanoj kaj esperantistoj el la tuta Pollando, sed ankaŭ al multaj diverslandaj samideanoj, kiuj partoprenis la voĉdonadon. La trajno Esperanto ekcirkulos en decembro, kaj ĝin jam povos uzi la partoprenantoj de la tradiciaj Zamenhofaj Tagoj en la naskiĝurbo de Esperanto. *–L. Kordylewski*

**Oriento:**

En Kazan, la ĉefurbo de la rusia respubliko Tatarstano, la urbestraro la 26-an de junio decidis ŝanĝi la nomon de strato Esperanto. La nova nomo iĝis strato Nursultan Nazarbajev, laŭ la multjara prezidanto de Kazaĥio.

Ne nur esperantistoj indigniĝis pro la decido, aperis ankaŭ aliaj kritikantoj, kiuj atentigas, ke ne estas laŭregule nomi stratojn laŭ vivantaj homoj. La 3-an de julio antaŭ la urbodomo de Kazan kolektiĝis manifestaciantoj, kiuj postulis nuligon de la decido, kaj skandis "Esperanto, Esperanto!".

La urbestro de Kazan İlsur Metşin parolis kun kelkaj ĉeestantoj kaj pardonpetis pro tio, ke la decido estis farita sen antaŭpreparoj – sed li samtempe diris, ke la decido nun validas kaj ne estos ŝanĝita. *–B. Kolker*